## ĉap.33 Kiu konas aliulon...

Kiu konas aliulon, tiu estas intelekta; kiu konas sin mem, tiu estas saĝa; kiu venkas aliulon, estas povhava; kiu venkas sin mem, estas forta; kiu scias sian sufiĉecon kontente, estas riĉa; kiu peneme agas, tiu havas ambicion; kiu ne perdas sian pozicicion, tiu longedaŭras; kiu mortis, tamen ne pereas, tiu estas longviva.

**Komentario:**
Aforismo el komuna saĝo. El la tria strofo la frazo "kiu scias sian sufiĉon, tiu estas riĉa" koincidas kun la fama frazo en budaista biblio, "Kiu ne scias sian kontenton, tiu, se li estas riĉa, estas malriĉa. Kiu scias sian kontenton, tiu, se malriĉa, esta riĉa." Kaj el ĉi-aforismo japana bonzo faris desegnon el kunmetitaj kvar ideogramoj "mi" 吾 "sci" 知 "nur" 唯 "kontent" 足, kaj ĝin gravurigis sur granito por la uzo de manlavvazo, kiu nun estas uzata en la templo Rjoanji, Kioto. (vidu ĉap.46)





## ĉap.34 La granda vojo, ja povas...

La granda vojo, ja, povas iri ĉiujn flankojn, ĉio naskiĝas dependante de tio, tamen tio ne rezignas. La merito fariĝas, tamen ĝi ne posedas kiel la nomon. Amante vartas ĉion, tamen ĝi ne fariĝas estro; nomu ĝin malgranda! Cîo ĝin atribuas, sed tamen ĝi ne fariĝas estro; oni do ĝin nomu granda! Pro tio sanktulo fin-fine ne fariĝas granda, tial ĝi kapablas fari grandan.

**Komentario:**
La humileco de virtulo agordiĝas kun la esenco de la vojo. Homoj kaj la universo povas unuiĝi laŭ tiu ĉi aksiomo.

## ĉap.35 Prenante la grandan...

Prenante la grandan fenomenon de l' vojo la mondo iras. Irante ne malutilas. Tio estas paca. Voj-irantoj haltus je muziko kaj manĝo, sed vortoj el la buŝo de l' vojo, ho, simplaj kaj sengustaj. Rigardi ĝin ne indas vidi; aŭskulti ĝin ne indas aŭdi, sed uzante ĝin oni trovas neforuzeblon.

**Komentario:**
Ne elĉerpebla granda fenomeno de l' vojo ne havas karakterizan guston. Se ĝi havus ian partian econ, ĝi ne povus senfine daŭradi.

**ĉap.36 Volante kuntiri ion...**

Volante kuntiri ion, nepre iom streĉu ĝin. Volante malfortigi ĝin, nepre iom fortigu ĝin. Volante aboligi ĝin, nepre iom leviĝu ĝin. Volante rabi ĝin, nepre iom donu ĝin. Ĉi tion nomas kaŝata lumo; mola venkas malmolan. Malforta venkas fortan; fido ne devas eliri de profundaĵo. Akraj bataliloj de regno ne montru antaŭ publiko.

**Komentario:**
"Mola venkas malmolan" kaj "malforta venkas fortan" estas la principo de ĵudo, kiu signifas "la vojo aŭ arto de molo". Tial la moralo de ĵudo ne permesas ataki, nur defendi aŭ fuĝi utiligante la forton de atakanto.



**ĉap.37 La vojo estas ĉiama kaj senartefara...**

La vojo estas ĉiama kaj senartefara, tamen ĉion faras. Reĝoj kaj princoj, se tion gardos, ĉiuj baldaŭ evoluos.[1] Se ili evoluinte volos funkcii, mi ĝin kvietigos per sennoma ŝtipo.[2] Ankaŭ la ŝtipo ne estas bezononta; se tiel estas kvieta, la mondo estas justiĝonta.

**Komentario:**
La nenionfaro estas substanco aŭ funkcio de la vojo. Tio estas "kvietismo" pozitiva.

**P.N.**
1) evoluos - aliformiĝos kaj asimiliĝos kun la vojo.
2) ŝtipo - nekonata sovaĝa materialo (vidu ĉap. 15, 19, 28, 32, 57)

MALSUPRA VOLUMO

**ĉap.38 Antikva virtulo ne pripensis...**

Antikva virtulo ne pripensis virton, pro tio li havis virton. Deposta virtulo penas ne perdi virton, pro tio ĝi ne havis virton. Antikva virtulo ne artefaris, tamen ne estis farita. Deposta virtulo porfaras, tamen ne perfaras. Antikva filantoropiulo porfaris, tamen ne perfaris; antikva justulo porfaris, tamen havas perfari; antikva etiketulo porfaris, tamen se iu ne konsentus, nome ĝi levis siajn ŝultrojn kaj altiris aliulon. Tial ĝi perdis vojon kaj poste aperis la virto; kaj perdinte virton poste aperis filantropio. Perdis filantropion kaj poste aperis justo. Perdis juston kaj aperis etiketo.[1] Jen la etiketo, nome maldensa de kredo kaj fidelo kaj etiketo de ribelo! Herolda scio estas floro de l' vojo, kaj komenco de malsaĝeco. Pro tio granda heroo lokiĝas dikan lokon, sed ne lokiĝas maldikan. Gî lokiĝas ĉe frukto, sed ne lokiĝas ĉe ĝia floro, tial for de tiu[2] kaj prenas ĉi tion.[3]

**Komentario:**
Forta protesto kontraŭ hipokritoj de artefarita doktrino de moralistoj. La vojo estas originala fonto de ĉio, kio ŝajnas nenion-faranta, tamen funkcias por ĉiam por ĉio. La virto, ĉine "te"; kunmetite kun la unuà litero de ĉap. 1. vojo "tao", t.e. "tao-te" signifas moralon. Gî estas karakterizo de la vojo, kaj enhavas filantropion, justecon kaj etiketon. La supra virto estas ekstremo de virto, tial ĝi agas nature nenion-farante kaj forgesus sian virtecon. Tamen pliposttempa virto estas diskonata en la mondo, pro tio ke ĝi estas artefara. El malsupra virto aperas skismoj: La filantropio - justeco - etiketo. La filantropio estas la amo, kiu ekagas tute nepostulanta rekompencon. La justeco estas disciplinema kaj ĝi ekagis post konsidero artefarema. La etiketo estas la agado laŭ la justeco artefarema relative; se eĉ unu el ili ne respondas, la etiketo ne povas konsisti. Resume ĝi estas flatema por malsuperuloj, tial ĝi estas plej formala kaj plej artefarema kaj hipokrita; la plej malproksima for de la vojo.

**P.N.**
1) etiketo - dececo, moralo.
2) for de tiu - etiketo.
3) prenas ĉi tion - la vojon.

## ĉap.39 En pratempo oni akiris...

En pratempo oni akiris unuecon; la ĉielo akiris unuecon, tial estas pura; tero akiris unuecon, tial estas kvieta;[1] dio akiris unuecon, tial estas spirita; valo akiris unuecon, tial pleniĝas,; ĉio akiras unuecon, tial naskiĝas; reĝoj akiris unuecon, tial fariĝas modelo de l' mondo. Jen unueco okazigas tion! Se la ĉielo ne farus per pureco, kredeble krevus. La tero eksplodus, se ne kun kvieto. Dio, se ne per spirito, kredeble haltiĝus. Valo, se ne pleniĝus, kredeble elĉerpiĝus. Cîo, se ne per naskiĝo, kredeble preiĝus. Reĝoj, sen justo sed altnoblaj, kredeble renversiĝus; tial nobleco originas de malalteco, baziĝas sur malalteco. Pro tio reĝoj mem nomas orfa, vidva kaj ne sufiĉa. Tio do, faras malaltecon, originon, ĉu ne!? Tial, se oni kalkulus radon ekstreme analize, malaperus la rado. Sed ne, kiel poluritaj juveloj aŭ dis-metitaj ŝtonoj.

**Komentario:**
Se unueco paca kaj harmonia ne ekzistus, la ĉielo krevus; la tero eksplodus; ĉiuj pereus. Tiu ĉi ĉapitro estas profetaĵo kaj averto je antagonismo inter ŝtatoj kaj potenculoj. Gî ankaŭ estas analizo de aŭtoritateco, kiu konsistas el nenia noblvalora elemento. Tiu ĉi apologo de rado ankaŭ sin-trovas en buda biblio. "Maha prajna paramita".

**P.N.**
1) kvieta - paca.

## ĉap.40 Retroira redukto...

Retroira redukto estas movo de l' vojo; malforto estas funkcio de l' vojo. Cîo en la mondo naskiĝas de ekzisto; ekzisto naskiĝas de nenio.

**Komentario:**
La vojo ne funkcias per forto. Ekzisto okazas en kontrasto relativeca kun malekzisto. Cî tiu ĉapitro iniciatas la stabilan intuician filozofion, ĵanon de budaismo.

## ĉap.41 Supra sinjoro aŭdinte...

Supra sinjoro,[1] aŭdinte la vojon, diligente agas tion; meza sinjoro, aŭdinte la vojon, kredas aŭ ne kredas; malsupra sinjoro, aŭdinte la vojon, ridegas. Se ĝi ne ridus, tio ne

suficas esti la vojo; tial en la libro "Propono"[2] estas dirita, ke la luma vojo ŝajnas malluma;[3] marŝanta vojo ŝajnas retiriĝi, glata vojo ŝajnas malglata; supra virto ŝajnas senenhava valo;[4] tro blanka ŝajnas malpura; vasta virto ŝajnas ne sufiĉa, starigata virto kvazaŭ maldiligenta; esence vera koloro ŝajnas paliĝema; larĝega kvadrato ŝajnas sen anguloj; granda ulo fariĝas malfrue; granda sono ŝajnas senvoĉa; granda fenomeno ŝajnas amorfa. La vojo sinkaŝas sennome. Jen, la vojo nur bone atendas tempon ĝis elfaro de ĉio.

**Komentario:**
Konkreta klasifikigo de la vojo kaj virto.

**P.N.**
1) supra sinjoro - antikva aŭ ideala seriozulo.
2) la libro "Propono" - atikva nekonata libro.
3) malluma - ne intelekta.
4) valo - senenhavego.



## ĉap.42 La vojo naskas unuon...

La vojo naskas unuon;[1] unu naskas du,[2] du naskas tri,[3] tri naskas ĉion. Cîo dorsŝarĝas nagativon kaj frontŝarĝas pozitivon. Kaj harmoniigas ĉion per neŭtra atomosfero; popolo nur malamas orfan, vidvan kaj ne sufiĉan.[4] Kaj reĝoj faras tion sia titolo (vidu ĉap.39). Tial iuj aŭ[5] malprofitas ĝin, sed profitas, aŭ profitas ĝin, sed malprofitas. Kion oni instruis,[6] tion mi ankaŭ instruas; obstina buĉemulo ne akiras ĝian naturan morton. Mi intencas ŝati tion kiel originan instruon.

**Komentario:**
Jen, Lao-cu estis iniciatoro de atomismo en Oriento. Kaj bazante sin sur tio, li induktis fundamenton de homa vivado. La unuo estas neŭtrono, "du" estas protono, kaj "tri" estas elektrono. Jen estas la fundamenta atomismo de Lao-cu.

**P.N.**
1) unuo - ekstrema poluso.
2) du - pozitivo kaj negativo.
3) tri - ĉielo, tero kaj homo.
4) orfa, vidva kaj ne sufiĉa - humila titolo de superulo.
5) iuj aŭ ∸ humilemulo estas estimata kaj arogantulo estas malestimata.
6) Kion oni instruis - antikva instruo.

ĉap.43 **Ekstremo de moleco...**

Ekstremo de moleco en la mondo kuras kaj ĉasas ekstremon de rigideco de l' mondo; malesta ekzistaĵo eniras en senspacon. Mi do, scias, ke nenionfaro estas utila; Instruo de ne-parolo kaj profito de nenionfaro, en la mondo nenio egalas ilin.

**Komentario:**
Sugesto pri la kvar-dimensio de anti-Eŭkrido. La super-tridimensia ideo estas unika aplikaĵo de la filozofio de Lao-cu. Li kredis, ke liaj opinioj estas mondgvidaj.

ĉap.44 **Kiu estas pli kara...**

Kiu estas pli kara, la honoro aŭ korpo? Kiu superas, vi mem aŭ trezoro? Kiu estas pli aflikta, gajno aŭ perdo? Se tre amus ion, certe elspezus multe; se rezervus multe, certe perdus ege. Se scias sian sufiĉecon, ne estas ofendita. Se scias halti, ne kompromitiĝas. Do, povas esti longedaŭra.



**Komentario:**
Bona aforismo por ĉiutaga vivado. (vidu ĉap. 33)

ĉap.45 **Granda sukceso ŝajnas...**

Granda sukceso ŝajnas kvazaŭ mankanta, sed ĝi funkcias, ne fiaskas. Granda pleniĝo ŝajnas kvazaŭ senenhava, sed ĝia funkcio ne finiĝas; granda rekto ŝajnas kvazaŭ fleksa; granda lerteco ŝajnas kvazaŭ fuŝa (vidu ĉap.22); granda elokvento ŝajnas kvazaŭ balbutema; maltrankvilo povas venki malvarmon; kvieto povas venki varmon, sed stabilo faras modelon de l' mondo.

**Komentario:**
Psika ekvilibro devas esti modelo de l' socio, t.e. kvietismo laŭ Lao-cu.

ĉap.46 **Se en la mondo sintrovas...**

Se en la mondo sintrovas la vojo, oni povas tiri armeajn ĉevalojn por terkulturado. Se en la mondo ne sintrovas la vojo, naskas armeoj ĉevalidojn en longa bivako ĉirkaŭ urboj. Ne

estas krimo pli granda ol volema; ne estas kulpo pli granda ol akirema, tial konante kontenton, kaj tio suficâs, do ĉiam kontentas.

**Komentario:**
Antimilitarismo de Lao-cu venas de lia opinio kontraŭ avida volo de homo. (vidu ĉap.33, 34)

### ĉap.47 Eĉ se ne eliri el la pordo...

Eĉ se ne eliri el la pordo, scii la mondon,; eĉ se ne trarigardi fenestron, vidi ĉielan vojon. Ju pli eliri malproksimen, des pli scii malmulte. Pro tio sanktulo ne iras, sed scias; ne vidas, sed evidenta; ne faras, sed ĉio fariĝas.

**Komentario:**
La idealo de senartefara plenumo devenas de komunikiĝo de homa sento kaj natura fiziko en la vojo.



### ĉap.48 Fari lernon ĉiutage...

Fari lernon ĉiutage profitas; fari la vojon ĉiutage malprofitas, malprofito plus malprofito, tiel atingos ĝis nenionfaro. Nenionfaro, sed ne estos io ne farita! Tial preni la mondon,[1] ĉiam faru per senafero. Se atingos okazi io grava, tio ne taŭgas preni la mondon.

**Komentario:**
Fari nenionfaron signifas okazigi nenion gravan en la mondo. Do paco regas la mondon.

**P.N.**
1) preni la mondon - influi ideale en la mondon.

### ĉap.49 Sanktulo ne havas...

Sanktulo ne havas porĉiaman koron, sed prenas la koron de popolo por sia koro. La bonan mi vidas bona, malbonan mi ankaŭ vidas bona. Ĉar virto estas bono. Kredindan mi ĝin kredas; ne kredindan mi ankaŭ ĝin kredas, ĉar virto estas kredo. Sanktulo, sintrovante en la mondo, timeme por la mondo senpartiigas la koron. Do,

popolo ĉiu alturnas siajn orelojn kaj okulojn. Sanktulo vidas ilin ĉiujn infanetoj.

**Komentario:**
La koro de popolanoj ne povus juĝi laŭ la mezuroj de bono kaj malbono. Lao-cu deziras evoluigi ilin laŭ nenionfarado kiel naivan infaneton.

### ĉap.50 Elirinte el vivo...

Elirinte el vivo, eniras morton; kolegoj de vivo estus tri el dek. Kolegoj de morto estus tri el dek; el popolanoj iuj volas vivadi, sed ofte, kiuj foriras al morto, tri el dek. Jen, pro kio? Ĉar ili tro persistas ŝati kreskigi vivon. Verŝajne, mi aŭdas, se bone abstinanta, eĉ se vojaĝas sovaĝlandon, ne renkontas sovaĝvestojn; eĉ se iras inter armeoj, ne estas vundata de armiloj; eĉ se rinocero, ne trovas lokon piki per la kornoj, eĉ se tigro, ne trovas lokon meti la ungegojn, kaj soldatoj ne trovas lokon enmeti la glavojn. Pro kio? Ĉar tiu ne havas mortlokon!



**Komentario:**
Tiu ĉi estas emfazo por valoro de abstino kaj kredo de senperforta rezisto kontraŭ violenco, ĉar morto kaj vivo estas du fenomenoj sur unu linio de relativeca sorto.

### ĉap.51. La vojo naskas ĝin...

La vojo naskas ĝin, la virto nutras ĝin, ĉio formas ĝin, energio elfaras ĝin. Pro tio, ĉio estimas la vojon, kaj nenio malŝatas la virton. Estimo de vojo kaj ŝato de virto, neniu nobelinstaligas, sed ĉiam nature estas tiel. Tial la vojo naskas ĝin, la virto nutras ĝin, kreskigas[1] ĝin, edukas ĝin, elfaras ĝin, maturigas ĝin, kulturas ĝin kaj protektas ĝin. Produktas ĝin, sed ne posedas; faras, sed ne ĝin dependas. Kreskiĝinte ne mastrumas; tion oni nomas mistera virto.

**Komentario:**
La natura vojo kaj virto ĉiam funkcias per senaŭtoritateco aŭ devigo, sed en la kosmo ĉio iras bone, escepte de fuŝa homa artefaro.

**P.N.**
1) kreskigas - ĉefiĝi.